Chu vi estis ?
(Te voltál?)

Rakontis la arbaro –
Estis somero
Kaj venteto muzikis sur la montopintoj
Chu vi estis ?
Chu vi ?

Kien flugis la somero ?
Lazuroblua estis la chielo,
kaj malaperis, kiel facila somera roso.
Chu vi estis ?
Chu vi ?

Piedsigno via ankorau tie
sur la seka foliartavolo.
Sed jen, chu vi audas ?
Inter la branchetoj
shrikas jam la vento.
Se denove estos somero,
Mi kredas vi revenos denove.

Unu
nur unu diru !
Inter duboj muelighante
mi demandas:
Chu vi estis ?
Chu vi ?

Via hararo flirtighis
sur veluro de foliaro,
kaj inter negheroj ,
chu lumon de viaj okuloj mi vidis ?
Chu vi estis ?
Chu vi ?

Sur la chielo, sur herbaro
en kamparo, en arbaro
en akvo kaj inter ondoj
de maroj
kaj sube
en kashejo de konkoj
Chu vi estis ?
Chu vi ?

Tradukita de János Ruff